Esperanto-Alianco de Gotenburgo
havos sian jarkunvenon merkrede 29 marto 18.00
en Esperanto-Centro.

*

Traduka ekzerco

Gajninto de la traduka konkurso en la lasta numero estas Gustav Larsson. Gratulon al li!

Por sciiĝi pri diversaj tradukaj versioj, vin turnu al Christer Lörnemark.

Jen nova teksto por traduki. La plej bona ensendita traduko ricevos premieton.

Ersättning för hackad stång?

John Erik Johansson i Hindås är minst sagt förgrymmad. Han har en hackspett i grannskapet. Den vassnäbbade fågeln har fattat tycke för familjen Johanssons flaggstång. Så mycket tycke att hackspetten förstört den.

John Erik Johansson vill nu ha ersättning för den förstörda flaggstången. Han vänder sig till viltskadefonden på länsstyrelsen i Göteborg. Om han får några pengar är ännu oklart.

Bohusläningen 940823

*

Ĉiumarde loka kunveno en nia klubejo je h 19.oo-21.oo
Varje tisdag sammanträde i vår lokal kl. 19.00-21.00

*

La estraro de Esperanto-Societo de Gotenburgo

Christer Lörnemark, prez	0522 - 856 27
Andreas Nordström, sekr	031 - 52 59 72
Anders Mellbratt, kasisto	- 29 52 78
Gertrud Brestan, vicprez	- 46 91 76
Bo Sandelin, vicprez	- 91 85 54
Ralf Jalming, anstataŭanto	- 51 09 55
Fredrik Olofsson, anst.	- 19 84 49

Novaĵoj kaj tekstoj por inter-LIGILO 2:95 estu ĉe la redaktantoj plej laste **la 11-an de aprilo 1995.**

Nyheter och texter för inter-LIGILO 2:95 bör vara hos redaktörerna senast **den 11 april 1995.**

N-ro 1: 95

inter-LIGILO

EsperantO

Membrogazeto de la Esperanto-Societo de Gotenburgo

Ne-membroj povas aboni ĝin kontraŭ 40 kronoj jare. Monkontribuoj estas ĉiam bonvenaj. Abonkotizojn kaj donacojn vi povas sendi al la kluba poŝtĝiro 4 36 12 -1 kun la noto "Por la informilo".

Responda eldonanto: Aira Kankkunen; Tel.+fakso: 031-18 79 82

Redaktantoj: Aira Kankkunen; Inga Johanson Tel: 031-15 57 23
Martin Weichert Tel: 031-778 44 14;
Christer Lörnemark Tel: 0528-310 87

Adreso: Masthuggsliden 1. **413 18 Göteborg;** 031-12 05 94

Jarkunveno

de Esperanto-Societo de Gotenburgo

la 21-an de marto 1995
komencante je la h. 18.
en Esperanto-Centro de Gotenburgo
Masthuggsliden 1

Attilio Orellana Rojas el Argentino rakontos pri siaj vojaĝoj kiel E-instruisto diversloke en la mondo.

Kafo ktp. - Loterio

Bonvenon!

Karaj Legantoj!

Plejunue: Bonegan sukcesan novan jaron al ĉiuj legantoj de *inter-LIGILO!* La nova laborjaro jam komenciĝis. Por ni, nordaj e-istoj, ĉi tiu jaro estas eksterordinara - ni ja havas **la 80an Universalan Kongreson de Esperanto en Finnlando,** en la bela urbo **Tampereo,** kiu situas meze de du lagoj, krome meze en la urbo fluas la torento, Tammerkoski. La kongresejo, Tampere-Halo, estas ege taŭga por kongresoj kaj ĝi estas eĉ bela. La plej granda halo akceptas 2000 homojn, kaj en la sama domo troviĝas pluraj aliaj ejoj por diversaj aranĝoj. La kongresejo troviĝas en la urbocentro, kaj la rezervitaj hoteloj kaj la aliaj loĝejoj estas tute proksime al la kongresejo.

Venu rigardi kaj renkontiĝi kun esperantistoj de la tuta mondo!

Ĉi-jare eĉ **UNo havas sian festojaron** - dum la tempo kiam multaj etlandoj suferas meze de militoj bataladante por sia sendependeco. La naskiĝo ĉiam kaŭzas dolorojn, eĉ tiam kiam temas pri landaj sendependecoj. Dum la bataladoj multaj mortas, sed pli multaj suferas; sen hejmo, vunditaj ili iradas el unu lando al la aliaj. Ili bezonas helpon. Ni - kiuj vivas sen milito, havas hejmon kaj ĉiutage povas manĝi ĉe la propra manĝotablo tiun manĝaĵon, kiun ni elektas, eĉ tiel multe ni volas - havas grandan favoron esti flanke de donantoj.

Dezirante ĝojon de donacanto salutas vin
Aira.

Kära Läsare!

Allra först önskar *inter-LIGILO* till alla läsare god fortsättning för året 1995! Ett nytt arbetsår har börjat. För esperantister här i Norden är detta år alldeles speciellt - den 80e ***Universala kongreso de Esperanto*** hålls här i Norden, i Finlands vackra stad Tammerfors, som ligger mellan två sjöar och därtill strömmar genom staden en fors, *Tammerkoski.* Och inte bara staden men även möteslokalerna i Tammerforshuset är vackra. I den största möteslokalen ryms 2000 personer, därtill finns det flera andra lokaler för olika aktiviteter. Hotellen och de andra inkvarteringslokalerna för kongresssens deltagare är nära Tammerforshuset. **Kom med** och träffa esperantister från alla delar av världen!

Det här året är även **FN:s jubileumsår**, i en tid när flera minoriteter lider mitt i kriget kämpande för sina rättigheter för att ha ett självständigt land. Förlossningen skapar alltid smärtor, även då det är frågan om ett lands självständighet.

Under kriget stupar många, men ännu flera är deras antal, som har fått sitt hem förstört och som nu vandrar hemlösa från det ena landet till det andra. De behöver vår hjälp. Vi, som är sparade av kriget, som kan sätta oss framför ett dukat bord, välja det vi behagar och äta oss mätta, har fått privilegiet att vara på de givandes sida och ge - från vårt överflöd - till dem, som inget har.

Jag önskar till er givarens glädje.
Aira

*

Pri la agado de Esperanto-Societo de Gotenburgo dum 1994

1994 estis tre aktiva jaro por nia klubo. Estis grandaj kunvenoj unufoje po monato (escepte dum la somero), en majo eĉ du kunvenoj. Okazis 4 interesaj prelegoj, i.a. de Detlev Blanke (Germanio) pri interlingvistiko. Pastro Burckhardt (Germanio) rakontis pri siaj profesiaj kaj aliaj spertoj kaj kunkantigis la ĉeestantojn. En decembro okazis la tradicia Tago de la Libro, kiam parolis Ebbe Vilborg pri la librorikolto de la jaro.

En junio ni faris ekskurson al Tahult en Landvetter (kie la E-Movado posedas terpecon), kaj vizitis Siv kaj Sven Burell en ilia somerdometo en Stannum. Inga Johanson ankaŭ ĉijare aranĝis diversajn somerajn aktivecojn.

En la klubejo okazis dum la jaro 5 studrondoj pri Esperanto kaj 1 pri E-informado. La grupo laboranta pri la historio de la Gotenburga Esperanto-Movado pretigis sian libron.

La plej granda aranĝo de la jaro estis la Esperanto-Semajno en septembro, aranĝita kune kun la E-Alianco – semajno plena de prelegoj, kursoj, festoj, teatraĵoj kaj aliaj aranĝoj, kun la instruistoj kaj prelegantoj Andreo Pettyn (de Pola Radio) kaj Jadwiga Gibczynska (el nia ĝemela klubo en Krakovo).

Je ekstera informado plej elstaris publika debato en la Urba Biblioteko kadre de la Esperanto-Semajno. Granda artikolo pri E aperis en Göteborgs-Posten kaj Tidsspegel. En la legantara kolumno de Göteborgs-Posten aperis 2 skribaĵoj por-Esperantaj. Aira Kankkunen intervjuiĝis pri Esperanto en Ruotsin Suomalainen, gazeto por finnoj loĝantaj en Svedio.

En junio vizitis nin du esperantistoj, kiuj estis piedirantaj de sia sud-Franca hejmurbo al ties ĝemela urbo Alingsås.

Jen eroj el nia pasintjara agado. Ni esperu eĉ pli aktivan 1995!
Andreas Nordström

*

Esperanto-klubo de Kungälv

havis jarkunvenon la 21-an de februaro. La estraro povis raporti grandan aktivecon de la pasinta jaro: Post la jarkunveno la estraro aspektas jene: Märtha Andréasson (prez.), ceteraj estraranoj Marianne Nilsson, Solweig Eek, Johnny Andréasson, Marianne Nilsson, Majken Svensson. (La estraro dividos inter si la postenojn.) Anstataŭantoj Margareta Andersson kaj Hellfrid Karlsson.

*

Esperanto-rörelsen i Göteborg 1892–1992 trycks som bilaga till detta nummer av inter-Ligilo, och kommer i början av mars att kunna köpas i vår lokal. Pga portokostnader kommer boken att skickas hem endast till dem som särskilt betalt för detta.

*

Attilio Orellana Rojas
(kies nonom vi trovas sur la unua paĝo) estas konata E-instruisto el Argentino. Li vizitos Gotenburgon 20–24 marto. La 21-an li gastos nian jarkunvenon. Merkrede li ĉeestos la kursojn en Esperanto-Centro, kaj merkredevespere 19.00 li parolos samloke pri la Ĉe-metodo. Ĵaŭdovespere li parolos en Kungälv (Kvarnkullen) je la h. 19a pri siaj vojaĝoj k.a.

*

Seminario: Opinioj pri lingvoellernado en Altlernejo de Södra Vätterby en Jönköping 25-26. 3. 1995. Rigardu la separatan informfolion!

Seminarium: Synpunkter på språkinlärning den 25-26 mars 1995. Läs mera om det på det separata bladet .

*

Jarkongreso de Sveda Esperanto-Federacio (SEF) okazos ĉi-jare la 6-7-an de majo en Hjo. Pli detalaj informoj en la venonta *La Espero* .

*

Esperanto-kursoj daurigas

Kurso por komencantoj daŭrigas ĉiumerkrede je la 14-a h. en E-Centro de Göteborg. Kontaktiĝu kun Märtha. Tel: 031- 57 11 33.

Konversacia rondo ĉiumerkrede je la 11-a h. en E-Centro de Göteborg Kontaktiĝu kun Aira. Tel 031-18 79 82.

*

Esperanto Unuiĝo de Næstved en Danlando informas:
La Dana Esperanto-Jarkongreso 1995 okazos en sudselanda urbo **Næstved en Migrulhejmo** dum la semajfino la 1- 2-an de aprilo 1995. La aranĝo estas malferma al ĉiuj esperanto-parolantoj. **Sabate** posttagmeze prezentado de la dana junulara Esperanto-movado, vespere festeno kun dancado. **Dimanĉe** antaŭtagmeze prelegoj de Klaus Schubert pri *Lingvo kaj komputilo* kaj de Birthe Lapenna pri *La eventoj dum la UK en Hamburgo 1974; ĝiaj kialoj kaj konsekvencoj.*
Aliĝo kaj pliaj informoj ĉe
Esperanto Unuiĝo de Næstved,
Fyrrevænget 4,
DK-4700 Næstved, Greta Nielsen.

*

Esperantista Klubo-UNESCO en nia amikurbo, **Krakovo**, aranĝos **Krakovan Esperantan Printempon 29.04–04.05** kun bonegaj programeroj kaj sciencaj kaj kulturaj.
Por pliaj informoj vin turnu al
Esperantista Klubo-UNESCO
Ul. Garbarska 1
31-131, Kraków, Pollando.

*

Internacia koresponda lingvokurso
Se vi havas malmulte da tempo, se vi ne povas viziti lingvokurson, se vi mem volas difini vian rapidecon en la lernado, partoprenu *la Internacian korespondan lingvokurson* de progresantoj. La partoprenkotizo diferencas laŭ la jara nacia enspezo. Se vi ne povas transpagi, aŭ pagi, tamen ni ŝatus perfektigi vian lingvoscion, skribu al ni kaj ni klopodos trovi solvon por vi. Pliaj informoj ĉe
Hungaria Esperanto-Asocio
Pf. 193.
H-1396 Budapeŝto

*

Parolas Varsovio en Esperanto
Post longdaŭra malbona aŭdebleco de E-elsendoj de Pola-Radio ni ree povas aŭdi eĉ en Göteborg kaj eĉ sufice bone temante pri la posttagmezaj elsendoj **je la h. 15.30-15.55 plejbone pere de la frekvenco 41,99m/7145 kHz**; Tamen - bedaŭrinde ni ne povas aŭdi la vesperajn elsendojn.

*

Ĉu vi jam pagis la jarkotizon de nia E-societo kaj SEF? Se ne, faru tion rapide. Ni bezonas monon.

Har Du betalat Din medlemsavgift till vår E-klubb och SEF? Om inte, gör det snart! Vi behöver pengar!

*

Esperanto-Centro de Gotenburgo
estas la oficiala nomo de nia klubejo, kie ja agas pluraj E-asocioj. Estas konsilinde uzi la plenan nomon kiam ajn estas risko je konfuzo kun Esperanto-Centro en Stokholmo. En *inter-LIGILO* ni pro mallongeco uzas la formon Esperanto-Centro.

*

Nekrologo

La 11-an de januaro forpasis Oskar Svantesson, en la aĝo de 90 jaroj. Li estis unu el la grandaj ĥomoj de nia loka movado, aktiva pri Esperanto en la urbo ekde la 20-aj jaroj. La enterigo okazis la 27-an de januaro; ĉeestis 5 gotenburgaj esperantistoj.
Pli detala nekrologo troviĝos en "La Espero", "Esperanto" kaj "Heroldo".